



## UvA-DARE (Digital Academic Repository)

### 'Lingvo Internacia' aŭ 'internacia ligneo'?

*Kelkaj konsideroj pri la origina nomo de Esperanto en diakrona perspektivo*

Gobbo, F.

#### Publication date

2016

#### Document Version

Final published version

#### Published in

Prilingve en Nitro politike, historie, teorie, instrue

#### License

Article 25fa Dutch Copyright Act (<https://www.openaccess.nl/en/policies/open-access-in-dutch-copyright-law-taverne-amendment>)

[Link to publication](#)

#### Citation for published version (APA):

Gobbo, F. (2016). 'Lingvo Internacia' aŭ 'internacia ligneo'? Kelkaj konsideroj pri la origina nomo de Esperanto en diakrona perspektivo. In S. Košecký (Ed.), *Prilingve en Nitro politike, historie, teorie, instrue: Fakaj prelegoj prezentitaj kadre de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto* (pp. 149-158). Universala Esperanto-Asocio.

#### General rights

It is not permitted to download or to forward/distribute the text or part of it without the consent of the author(s) and/or copyright holder(s), other than for strictly personal, individual use, unless the work is under an open content license (like Creative Commons).

#### Disclaimer/Complaints regulations

If you believe that digital publication of certain material infringes any of your rights or (privacy) interests, please let the Library know, stating your reasons. In case of a legitimate complaint, the Library will make the material inaccessible and/or remove it from the website. Please Ask the Library: <https://uba.uva.nl/en/contact>, or a letter to: Library of the University of Amsterdam, Secretariat, Singel 425, 1012 WP Amsterdam, The Netherlands. You will be contacted as soon as possible.

# PRILINGVE EN NITRO

politike, historie, teorie, instrue





# PRILINGVE EN NITRO

## politike, historie, teorie, instrue

Fakaj prelegoj prezentitaj kadre de la  
101-a Universala Kongreso de Esperanto

*Redaktis: Stanislav Košecký*

### *Aŭtoroj*

*Vytenis Andriukaitis, Peter Baláž, Věra Barandovská-Frank, Aleksandr D. Duličenko, Michele Gazzola, Federico Gobbo, Ariadna García Gutiérrez, Emil Heršak, Christer Kiselman, Jouko Lindstedt, François Lo Jacomo, Anna Löwenstein, Lýdia Machová, Vojtěch Merunka, Martin Molhanec, Slavomír Ondrejovič, Eva Poláková, Seán Ó Riain, Chuck Smith, Jan van Steenbergen, Ildikó Vančo, Lu Wunsch-Rolshoven, Pavol Žigo*

Universala Esperanto-Asocio

Rotterdamo 2016



ISBN 978-92-9017-130-0

© 2016 UEA kunlabore kun SKEF

Kovrilo: Edoardo Nannotti

Enpaĝigo: Matthieu Desplantes

Tradukoj en Esperanton: Pavol Petřík, Michael Dubery

Provlegado: Matthieu Desplantes, Stanislav Košecký

Presita ĉe Fork, s.r.o., Martin, Slovakio

## ‘Lingvo Internacia’ aŭ ‘internacia lingvo’?

### Kelkaj konsideroj pri la origina nomo de Esperanto en diakrona perspektivo

FEDERICO GOBBO

#### 1. Enkonduko

La faka literaturo en esperantologio donas multe da atento al la morfologio. Fakte, morfologio estis la unua parto de la lingvo, kiu estis akre atakita laŭ scienca vidpunkto de Couturat (11) por klopodi konvinki la intelektularon, ke Ido estis plibonigita versio de Esperanto. Por lin kontrasti, Saussure (12) ĵetis la bazon por morfologia analizo de Esperanto per sia teorio pri vortformado. Eĉ Zamenhof, la fondinto de Esperanto, en la netuŝebla bazo de la lingvo, t. e. la *Fundamento de Esperanto*, donis neniun indikon pri sintakso. Tamen, per la konkreta lingvouzo en la originaj tekstoj, la lingvo rapide ekstabiligis. Onidiroj pri absoluta libereco en la vortordo ankoraŭ svarmas inter Esperanto-parolantoj, eĉ se tio veras nek por Esperanto nek por ĉiu alia homa lingvo.

Feliĉe en la faka literaturo estas du ampleksaj korpusaj analizoj de Esperanto, fare de Gledhill (3, 4) kaj Jansen (1, 2), kiuj konvinke montras, ke la baza vortordo de Esperanto estas SVO, t. e. subjekto-verbo-objekto. Krome, klaras, ke la baza vortordo de adjektivoj kaj substantivoj estas adjektivo-substantivo (mallongigite ekde nun kiel AdjN), dum la ordo substantivo-adjektivo (mallongigite ekde nun kiel NAdj) estas markita. Tabelo 1 montras la elcentaĵojn de la lingvouzo en la korpusoj uzitaj en la verkoj supre menciitaj. Aparte rimarkinda estas, ke la Zamenhofa Esperanto (mallongigite ekde nun kiel ZE) ne tro malsimilas al la posta uzo.

	AdjN	NAdj
(3, 98)	97,12 %	2,88 %
(1, 25)	96,4 %	3,6 %
ZE (1)	88 %	12 %

Tabelo 1: La vortordo de adjektivo kaj substantivo en Esperanto

Laŭ la studo de Melnikov (10, 191) la frazemo<sup>1</sup> ‘lingvo internacia’ estas unu el la plej gravaj esperantonimoj de Esperanto, kiu povas indiki:

1. majuskle, la origina nomo de la lingvo Esperanto;
2. minuskle, ajna lingvo, kiu servas por internacia komunikado;

1. Per ‘frazemo’, konstruita sur la paradigmo de ‘fonemo’ kaj ‘morfemo’, oni intencas indiki tipan multvortan esprimon aŭ idiomaĵon. Temas pri faka vorto de lingvistiko, uzata en multaj lingvoj.

3. kun la difinita artikolo *la*, Esperanto;
4. titolo de gravega Esperanto-gazeto de la pionira epoko (aperis en la jaroj 1895–1914).

Por atesti la unuan signifon, sufiĉas citi ĉi tie la gravan eseon de Zamenhof *Esen-co kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia*<sup>2</sup>. La tria signifo de Melnikov en la praktiko identas kun la unua. La kvara signifo estas memevidenta. Sed kio pri la dua signifo? Ĉu tio aperas en la ZE? Ĉi tiu mallarĝa studo intencas interalie respondi al tiu ĉi demando.

La ĉefa esplordemando, al kiu mi intencas respondi ĉi tie, tamen, estas alia: kial Zamenhof preferis nomi Esperanton ‘Lingvo Internacia’ (vortordo NAdj) anstataŭ ‘internacia lingvo’ (AdjN, kiu estus la nemarkita vortordo)? Por respondi al tiu esplordemando mi faros kvantan kaj kvalitan analizon.

Antaŭ ol komenci la duflankan analizon, oni devas respondi al antaŭa, implica demando: ĉu la frazemoj ‘internacia lingvo’ kaj ‘lingvo internacia’ estas gravaj? Por tion respondi, sufiĉas trarigardi la *Oftecvortaron de Esperanto* (5) kaj rigardi, kiom da frazeroj enhavas la vorton ‘lingvo’ ene. Tabelo 2 montras eltiron de tio.

Frazeroj	Oftecoklasoj
cellingvo(jn)	17-19
ĉeflingvo(jn)	17-20
eduklingvo	19
eldonlingvoj	19
etnolingvo(jn)	16-19
faklingvo(jn)	17-19
fikcilingvo(j)	19
floringvo	19
font(o)lingvo(j)	17-18
fremdlingvo(jn)	15-17
gest(o)lingvo(j)	17-18
...	...

Tabelo 2: Frazeroj kun ‘lingvo’ enhance kaj respektivaj ofteoklasoj

Kiel antaŭvideble, la temoj rilataj al la semantika areo ĉirkaŭ ‘lingvo’ estas multe pritraktataj de la esperantistaro. Similan rezulton oni povas vidi por la semantika areo ‘internacia’, kiu estas preskaŭ same ofta – vidu la tabelon 3 por eltiro.

2. Notindas, ke la nomo ‘Esperanto’ origine estis nur la plumnomo de Zamenhof, kiam li lanĉis la lingvon.

Vortigoj	Oftecoklasoj
internaci(ajn)	8-17
internaciaĵoj	19
internacias	19
internacie	12-15
internacieca(n)	18-19
internacieco(n)	14-16
internaciiga(n)	18-19
internaciigas	19
internaciigi	17
internaciigis	19
internaciigita(j)	18-19
...	...

Tabelo 3: Vortigoj kun 'internaci' en have kaj respektivaj oftocoklasoj

Do, la esplordemando ŝajnas meriti analizon por solida respondo. Per la respondo mi intencas ankaŭ klarigi, ĉu estas nuanco en la du frazemoj 'lingvo internacia' (minuskla aŭ majuskla) kaj 'internacia lingvo' – ĉefe laŭ la lingvouzo en la ZE.

## 2. Kvanta analizo

En la tuta verkaro de Zamenhof – 987 006 vortoj, el Wennergren (13) – la frazemo kun markita vortordo (NAdj) aperas sufiĉe ofte, kaj majuskle kaj minuskle, kiel montras la tabelo 4.

Sintagmo	Trovoj
lingvo internacia	107
lingvon internacian	6
lingvoj internaciaj	1
lingvojn internaciajn	0
Lingvo Internacia	1
Lingvon Internacian	0
Lingvoj Internaciaj	0
Lingvojn Internaciajn	0
Entute	115

Tabelo 4: Uzo de 'lingvo internacia' (majuskle kaj minuskle) en la ZE



Male, la uzo de la frazemo kun nemarkita vortordo (AdjN) estas ege rara en la ZE, kiel atestas la tabelo 5.

Sintagmo	Trovoj
internacia lingvo	4
internacian lingvon	0
internaciaj lingvoj	0
internaciajn lingvojn	0
Internacia Lingvo	0
Internacian Lingvon	0
Internaciaj Lingvoj	0
Internaciajn Lingvojn	0
Entute	4

Tabelo 5: Uzo de ‘internacia lingvo’ (nur minuskle) en la ZE

Do, estas klare, ke la uzo en la ZE ĉefe preferas la markitan vortordon (NAdj). Oni povas sin demandi, ĉu la uzo en la ZE estas kutima en la nuntempa uzo. Por tion respondi, oni povas eltiri du subkorpusojn el Wennergren (13), kiuj reprezentas sufiĉe aktualajn artikolojn el la moderna gazetaro: la unua subkorpuso enhavas la artikolojn de *Monato* (1993-1997) dum la dua tiujn de *La Ondo de Esperanto* (2001-2004). Kune ili sumas 1 477 500 vortojn, t. e. ĉirkaŭ 150 % de la aro da vortoj de ZE. La komparo do estas ebla.

	AdjN internacia(jn) lingvo(jn)	NAdj lingvo(jn) in- ternacia(jn)
Artikoloj el <i>Monato</i>	21	5
<i>La Ondo de Esperanto</i>	143	27
<b>Entute</b>	<b>164 (83,6 %)</b>	<b>32 (16,3 %)</b>

Tabelo 6: Uzo de la du frazemoj en la moderna gazetaro

La tabelo 6 montras, ke en la moderna gazetaro la ekvilibro en la du frazemoj estas tute inversa kompare al la lingvouzo de la ZE, kaj pro tio ĉi-lastata iĝas ankoraŭ pli interesa.

Resume, ni povas eltiri du provizorajn konkludojn el la kvanta analizo, kiuj utilas kiel gvidlinioj por la kvalita analizo:

- oni jam sciis, ke la nemarkita vortordo AdjN estis tia eĉ en la ZE;
- oni montris, ke en la moderna gazetaro la frazemo *internacia lingvo* (AdjN) estas multe pli ofta ol *lingvo internacia* (NAdj).

Do, la kvanta analizo montras, ke la Zamenhofa uzo de 'lingvo internacia' estis jam markita siatempe kaj eĉ pli ĝi estas markita en la moderna lingvouzo. Pro tio oni bezonas kvalitan analizon de la frazemoj en la ZE: per tio, mi povas klarigi la kialon de la elekto de la markita vortordo NAdj fare de Zamenhof.

### 3. Kvalita analizo

Antaŭ ol kvalite analizi la lingvouzon de la du frazemoj en la ZE, oportunas fari kelkajn kvalitajn rimarkojn pri la trovoj en la moderna gazetaro. El la 27 trovoj de la markita frazemo (NAdj) en *La Ondo de Esperanto*, post tralegado, oni malkovras, ke: unu trovo estas citaĵo de kajero de *LOdE* de 1917, do ekster la korpuso; unu trovo estas citaĵo de saluto de d-ro Zaleski-Zamenhof, kiu diris *neŭtrala lingvo internacia*, citante la Zamenhofan esprimon de la parolado en Bulonjo-ĉe-Marco de la avo en 1905 (nur unu trovo en la tuta ZE!); tri trovoj estas citaĵoj de la titolo *Esenco kaj Estonteco de la Ideo de la Lingvo Internacia*, grava Zamenhofa esejo; unu trovo estas citaĵo de la titolo *Ekzercaro de la Lingvo Internacia "Esperanto"*, verko de Zamenhof en kiu la "nova" nomo Esperanto preskaŭoficiale aperas; unu trovo estas klarigo de la Zamenhofa uzo 'lingvo internacia' anstataŭ 'lingvo helpa' okaze de faka prelego; unu trovo estas citaĵo el la Zamenhofa unua lernolibro. Do, el la 27 trovoj de la frazemo kun la vortordo NAdj nur 19 estas reale prinotindaj. Tio fortigas la argumenton, ke 'lingvo internacia' estas markita vortordo kaj starigas la hipotezon, ke tiu ĉi frazemo estas specifa por la ZE.

Pro tio, ni ĵetu pli proksiman rigardon al la uzo de la frazemo kun la vortordo NAdj en la ZE. Estas ununura trovo de 'Lingvo Internacia' (majuskle skribite) kaj mi grupigas ĝin al la trovoj de 'lingvo internacia' (minuskle), ĉar tiu trovo aperas je la komenco de frazo. La tabelo 7 resumas la uzon de la du frazemoj en la tuta ZE.

Frazemo	Troj	Frazemo	Troj
lingvo internacia	108	internacia lingvo	4
lingvon internacian	6	internacian lingvon	0
lingvoj(n) internaciaj(n)	1	internaciaj(n) lingvo(j)n	0
<b>Entute</b>	<b>116</b>		<b>4</b>

Tabelo 7: Uzo de la du frazemoj en la tuta ZE

Farendas kelkaj konsideroj. Unue, estas nur unu trovo en la plurala formo. La kunteksto estas la sekva:

*“novaj lingvoj internaciaj”, [notu la citilojn, NdR!] estas nur projektoj, en rapideco kaj sen sufiĉa pripensado elbakitaj projektoj, kiuj de realiĝo staras ankoraŭ tre kaj tre malproksime.*

Dua konsidero temas pri la fakto, ke la uzo de la frazemo kun la markita vortordo NAdj estas ĉefe nominativa. Fakte, en la akuzativa kazo estas nur 6 trovoj. Estas interese analizi kiujn verbojn Zamenhof uzi en ĉi tiuj 6 trovoj. Pli detale, unuela eltiro venas de *Kion Zamenhof ne povis diri en Ĝenevo* (verbon emfazis mi):

*Krom mia persona lingvo mi devas **posedi** ankaŭ lingvon internacian, por ke mi sen genta altrudemeco povu ĝin uzi.*

Ĉiuj aliaj venas de la jam menciita eseo *Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia*. Tio estis aparte interesa, ĉar temas pri eseo verkita ne nur por Esperanto-parolantoj sed ankaŭ por la ekstera publiko. Laŭ la *Enciklopedio de Esperanto* (1934), Zamenhof verkis ĝin sub la plumnomo Unuel kaj en jaro 1900 Louis de Beaufront prezentis ĝin en sia traduko en la francan al la Franca Akademio de Sciencoj. Jen la kunteksto (emfazoj miaj):

*En la daŭro de multaj centjaroj la homoj, ankoraŭ ne tre **bezonante lingvon internacian**, ne enpensiĝadis pri tiu ĉi demando (...) kolektiĝis kongreso el reprezentantoj de ĉiuj plej gravaj regnoj, por **elekti lingvon internacian**. (...) Ni **havus** sekve ne **lingvon internacian** en la vera senco de tiu ĉi vorto, sed nur **lingvon internacian** por la pli altaj klasoj de la societo. (...) ĝis la apero de Volapük kaj Esperanto estis grandega multo da diversaj provoj **krei artan lingvon internacian**;*

Ni povas rimarki, ke en la ZE la frazemo *lingvo internacia* indikas ĉefe Esperanton sed ankaŭ la ĝeneralan ideon de ilo por internacia komunikado, ĉu etnolingvo, ĉu planlingvo. Tiu ĉi konkludo konfirmas la analizon de Melnikov (10, 191), kies dua difino inkluzivas ajnan lingvon uzata por internacia komunikado. La uzo de la verboj estas aparte interesa. Fakte, por Zamenhof – laŭ la antaŭaj eltiraĵoj – por Zamenhof *lingvon internacian* oni: devas posedi; bezonas; elektas; havus (laŭ pli ampleksa kunteksto, nur sekve de elekto); kreis.

Plej ofte (114 trovoj) Zamenhof uzas la frazemon *lingvo internacia* kiel subjekton, kaj do en la nominativa kazo. Rimarkindas trarigardi la kvalitojn kiujn li foje atribuas al la frazemo. La tabelo 8 resumas la situacion.

Sintagmo kun kunteksto	Trovoj
la ideo(n) de lingvo internacia	18
la demando (de/pri) lingva internacia	3+3=6
ekzistado (mem) de lingvo internacia	3+1=4
formo(n) de lingvo internacia	4

la afero de lingvo internacia	2
celado(n) al lingvo internacia	2
la enkonduko de lingvo internacia	2
<b>Entute</b>	<b>39</b>

Tabelo 8: kvalitojn atribuitaj al la frazemo en la tuta ZE

Laŭ ofteco, la plej grava zorgo de Zamenhof estis klarigi la *ideon de lingvo internacia*, kaj poste ĝia demando, ekzistado kaj formo. Fine, estas ses hapaksoj (t. e. vortigoj troviĝantaj nur unu fojon en la tuta ZE). La tabelo 9 montras la kuntekston de la hapaksoj.

<b>Sintagmo kun kunteksto</b>	<b>Trovoj</b>
facileco de lingvo internacia	1
gravaj principoj de lingvo internacia	1
malamikoj de lingvo internacia	1
merito de lingvo internacia	1
neŭtrale-homa lingvo internacia	1
rolo de lingvo internacia	1
<b>Entute</b>	<b>6</b>

Tabelo 9: Hapaksoj de 'lingvo internacia' en la tuta ZE

La kvalitoj de *lingvo internacia* en la ZE estas tre klaraj. Nun ni vidu, se kontraste la uzo de *internacia lingvo* indikas aliajn trajtojn.

Ni jam vidis ke la frazemo kun nemarkita ordo AdjN estas ege rara. Kvalita analizo montras, ke *internacia lingvo* aperas 4 fojojn en preskaŭ identaj frazoj de *Dogmoj de Hilelismo* (1906, januaro) kaj en *Homaranismo*, (1906, post januaro). Notindas, ke ambaŭ verkojn Zamenhof publikigis anonime, nome de “unua rondeto hilelista”. Ni vidu la du citaĵojn kun abunda kunteksto.

*en la daŭro de tuta semajno [en Bulonjo, 1905, 22 diversaj popoloj, NdR] vivis kune en la plej sincera amikeco kaj frateco, parolis inter si ekskluzive nur en **neŭtrala internacia lingvo**, konfesis religiajn principojn nur neŭtrale-homajn. [...la iniciatoroj de la homaranismo, NdR] decidis proponi al ĉiuj amikoj de interpopola justeco unuiĝi en apartan grupon, kiu inter la amikoj de **internacia lingvo** prezentus apartan sekcion.*

Laŭ mi en la verkoj pri Hilelismo/Homaranismo en 1906 Zamenhof konscie ne verkas siastile, sed samkiel li estus “normala” esperantisto kiu partas la hilelistan ron-

deton. Pro tio, mi asertas, ke la frazemo kun markita ordo AdjN ‘lingvo internacia’ estas ne nur Esperantonimo, kiel asertas Melnikov (10, 191), sed eĉ *specifa Zamenhofonimo*, t. e., frazemo tipa de la ZE. La “normala” stilo eĉ por li estis la formo ‘internacia lingvo’ kun nemarkita ordo NAdj. Konklude, mia tezo estas la jena: Zamenhof konscie uzis la markitan vortordon NAdj por substreki la specialecon de Esperanto.

#### 4. Finaj konsideroj

Ambaŭ formoj – ‘lingvo internacia’ kaj ‘internacia lingvo’ – estis uzataj ekde la frua tempo de Esperanto. Fakte, jam en *Vojaĝimpresoj* (1895) enestas kaj ‘lingvo internacia’ (2 trovoj) kaj ‘internacia lingvo’ (2 trovoj) (13). En la pionira epoko, pro la influo de Zamenhof, ni povas supozi, ke la frazemo kun la markita vortordo NAdj estis pli prestiĝa ol la frazemo kun la nemarkita formo AdjN.<sup>3</sup> Probable ‘lingvo internacia’ (minuskle) estis pli uzita pro la ekapero de revuo *Lingvo Internacia* (majuskle), kiu ekzistis ekde 1895 ĝis la eksplodo de la mondmilito (1914).

Restas malfermita la demando kiam la formo ‘internacia lingvo’ populariĝis. Mia hipotezo estas, ke la inversigo de la proporcioj favore al ‘internacia lingvo’ verŝajne venas post la pionira periodo, kiam la influo de Zamenhof komencis malaltiĝi. Aparta rolo en tiu ĉi inversigo povas veni pro la ekapero de SAT, kiu enkondukis novan stilon en Esperanto – kiel ekzemplo, ni mallonge citu nur la formon de la landonomoj per *-io*. Fakte rapida trarigardo en Wennergren (13) de la verko *Vortoj de Kamarado E. Lanti* (verkojaroj: 1920-1929) montras, ke aperas nur 2 trovoj de la frazemo en la markita vortordo NAdj sed eĉ 10 trovoj de la nemarkita vortordo AdjN. Jam tiam, probable la frazemo *lingvo internacia* estis ekkonsiderita konscie-nekonscie Zamenhofa kaj do pionirstila. Tamen, por konfirmi ĉi tiun hipotezon necesas pli ampleksa studo.

#### Agnosko

La esploro portanta al ĉi tiuj rezultoj ricevis financadon de la Sepa Kadroprogramo de la Eŭropa Komunumo sub stipendi-akordo n-ro 613344 (Projekto MIME). La aŭtoro estras la specialan katedron de Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La enhavo kaj opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas nur al la aŭtoro kaj nenecese ili spegulas la opiniojn de UEA.

---

3. Konvencie, per ‘pionira epoko’ mi indikas la periodon 1887-1917, ekde la lanĉo de Esperanto ĝis la forpaso de Zamenhof, kaj mi celas la fenomenon Esperanto. Male, por ‘frua tempo’ mi indikas lingvan periodon 1887-1899, ekde la lanĉo de Esperanto ĝis la eniro en la movadon de la francoj, kiuj iĝis nacia plejmulto en la esperantistaro ekde jaro 1900.

## Bibliografio

1. W. Jansen, *Naturaj vortordoj en Esperanto*, Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2008.
2. W. Jansen, *Woordvolgorde in het Esperanto*, Ph.D. thesis, Universitato de Amsterdamo, 2007.
3. C. Gledhill, *A corpus-based grammar of Esperanto*, Lincomn Europa, 2<sup>nd</sup> edition, 1998.
4. C. Gledhill, *A corpus-based grammar of Esperanto*, Lincomn Europa, 1<sup>st</sup> edition, 1998.
5. U. Quasthoff, S. Fiedler, E. Hallsteinsdóttir, *Frequency Dictionary Esperanto*, Universitätsverlag Leipzig, 2014.
6. S. Fiedler, *Oftecvortaroj por Esperanto*, en: (7), pp. 136–149.
7. F. Gobbo (Ed.), *Lingua, politica, cultura: certa gratulatoria in honorem Renato Corsetti*, Mondial, 2016.
8. S. Fiedler, *Kultur und Plansprache: Betrachtungen zum Esperanto*, en: (9), pp. 181–202.
9. I. Busch-Lauer (Ed.), *Kaleidoskop der Kulturen*, Frank & Timme, 2010.
10. A. S. Melnikov, *Gvidlibro tra Esperantio: konciza leksikono de la Esperanto-kulturo: Esperantonimoj, realioj kaj flugilhavaj vortoj*, Rostov-na-Donu, 2015.
11. L. Couturat, *Étude sur la dérivation en Esperanto*, Brodard, Coloummiers, 1907.
12. R. Saussure, *Fundamentaj reguloj de la vort-teorio en Esperanto*, 1915.
13. B. Wennergren, *Tekstaro*, 2008. Korpuso financita de ESF.
14. R. Garvía, *Esperanto and its rivals: the struggle for an international language*, University of Pennsylvania Press, 2015.

## RESUMOJ

► En la unuaj priskriboj de la gramatiko de Esperanto kaj en siaj Lingvaj Respondoj, Zamenhof donis multan atenton al morfologio, t. e. la vortformado, kaj kompare malmultan atenton al sintakso, t. e. la vortordo. Jansen (1, 2) konvinke argumentas, ke la baza vortordo de la lingvo estas subjekto-verbo-objekto (SVO); aliflanke, en la kazo de la vortordo de substantivoj (N) kaj adjektivoj (Adj), ambaŭ ordoj AdjN kaj NAadj eblas, eĉ se AdjN nepre pli oftas (kiel ankaŭ Gledhill (3, 4)). Laŭ la *Oftecvortaro de Esperanto* (5) la vortoj ‘internacia’ kaj ‘lingvo’ troviĝas en alta oftecklaso de la tuta oftecvortaro, kaj tiel alta vortofteco estas pruvo pri ilia graveco en la kulturo de la lingvo – vidu Fiedler (6) en Gobbo (7) kaj Fiedler (8) en Busch-Lauer (9). La esprimo ‘Lingvo Internacia’ estas listigita kiel grava Esperantonimo en Melnikov (10, 191) kiel “origina nomo” de Esperanto. Ĉi tiu ĉapitro intencas prezenti kelkajn konsiderojn pri la pranomo en diakrona (t. e. tratempa) perspektivo, komparante la Zamenhofan

uzon de la esprimoj ‘Lingvo Internacia’ kaj ‘internacia lingvo’ per korpusa analizo.

► V prvých opisoch gramatiky esperanta a vo svojich „Lingvaj Respondoj“ venuje Zamenhof veľa pozornosti morfológii, t.j. formovaniu slov a v porovnaní s tým sa málo venuje syntaxi, t.j. slovosledu. Jansen (1, 2) presvedčivo argumentuje, že základným slovosledom jazyka je podmet-sloveso-predmet (SVO); na druhej strane, v prípade slovosledu substantív (N) a adjektív (Adj) sú možné obidve verzie: AdjN a NAdj, aj keď AdjN je oveľa častejšie (ako aj Gledhill (3, 4)). Podľa frekvenčného slovníka esperanta (5) slová *internacia* a *lingvo* sa nachádzajú vo vysokej triede frekvencie a takýto vysoký výskyt je dôkazom ich dôležitosti pre kultúru jazyka – pozri Fiedler (6) v Gobbo (7) a Fiedler (8) v Bush-Lauer (9). Výraz *Lingvo internacia* je zaznamenaný ako dôležitý esperantonym u Melnikova (10,191), ako „pôvodné meno“ esperanta. Tento príspevok má za cieľ predstaviť niekoľko úvah o tomto prameni v diachronickej perspektíve, porovnávajúc Zamenhofovo používanie výrazov *Lingvo Internacia* a *internacia lingvo* korpusovou analýzou.

► In the first descriptions of the grammar of Esperanto and in his “Linguistic Answers” (*Lingvaj Respondoj*), Zamenhof devoted a lot of space to morphology, while syntax received considerably less attention. Jansen (1, 2) argues convincingly that the basic word order of the language is SVO; on the other hand, in the case of the word order of nouns (N) and adjectives (Adj), both orders AdjN and NAdj are permissible, even if AdjN is more frequent (also Gledhill (3, 4)). According to the *Frequency Dictionary Esperanto* (5) the words “*internacia*” and “*lingvo*” are found among the highest ranked words of the entire dictionary, and this fact is a proof of their importance in Esperanto culture – see Fiedler (6) in Gobbo (7) and Fiedler (8) in Busch-Lauer (9) The expression “*Lingvo Internacia*” is here listed as an important “Esperantonym”, being the “original name” of Esperanto (Melnikov (10, 191)). This chapter aims to present diachronically some considerations regarding this original name through a corpus-based analysis of the usage of the expressions “*Lingvo Internacia*” and “*internacia lingvo*” in Zamenhof’s Esperanto.



**Federico Gobbo** estas speciala profesoro ĉe la Universitato de Amsterdamo (Nederlando) por estri la katedron Interlingvistiko kaj Esperanto. Li estas ankaŭ laŭkontrakta docento ĉe Universitato de Torino (Italio) por instrui kurson Planlingvoj kaj Lingvo-planado. Li partoprenas la EU-projekton MIME (Movebleco, Inkluziveco en Multlingva Europo) ĉe Universitato de Milano-Bicocca.